

Usonaj Mortigistoj
17,000 Popol-lernejoj Starigitaj
en NordĈinio
Ĉinaj Ministroj Havas Novan
Vivon
Laboristo-Inventisto Ju Ĉen-San
La Malgranda Administranto

EL POPOLA ĈINIO

Monata Informa Bulteno Eldonata de Fremdlingva Eldonejo
Redakcio kaj Administracio: 26 Kuo Hui Chieh, Peking, Ĉinio

VOL. II N-RO 1
JAN. 1951

Pro la Patrolando Kaj la Korea Popolo

Ĉinio Subtenas La Dek Proponojn De Varsovio

Defendante pacon per fervora konstruado kaj heroa batalo, la ĉina popolo ĉiam atento observas kiel progresas la batalo de la tutmonda pactendaro. Gojege kaj ekscitiĝe ili ricevas venkajn novaĵojn de la Dua Monda Paco-Kongreso. Fine, plenuminte sian komision donitan de la ĉina popolo, la ĉinaj delegitoj revenis el Varsovio. Je la 21a de decembro, 1950, ili atingis la Pekinan fervojstacion kaj estis kore bonvenigitaj de pli ol 1,000 reprezentantoj de Pekinaj organizoj. Sur la fervoja kajo, Ĉen Su-tung, (陳叔通) vicprezidanto de la Komitato de la Ĉina Popolo por Defendo de Mondpaco kaj Rezisto Kontraŭ Usona Agreso faris paroladon de bonvenigo al la pabatalantoj.

En sia respondo por la Delegacio, Kuo Mo-ĵo (郭沫若) diris, "La Dua Monda Paco-Kongreso instruis al ni ke ni ne devas atendi pacon, sed ĝin batalakiri, kaj ke por defendi pacon ni devas kontraŭi agreson, kontraŭi Usonian imperiismon kiu minacas mondpacon. La Kongreso unuanime akuzis la Usonajn imperiistojn kaj postulis ke la Usonaj imperiistoj kaj ĝiaj satelitoj retiriĝu el Koreio kaj ke la invada armeo de la Usonaj imperiistoj retiriĝu el Tajvan."

La padelegitoj foriris de la stacio inter la sono de kantoj kaj sloganoj de "Vivu mond-paco!" "Rezistu Usonian agreson!" kaj "Helpu Koreion!"

Denove, je la 24a en la sama monato, pli ol 5,000 laboristoj, armeanoj, studentoj kaj ceteraj civitanoj bonvenigis la ĉinajn delegitojn. Samtempe ili celebris la lastatempajn venkojn gajnitajn de la Korea Popola Armeo kaj la ĉinaj popularaj volontuloj en Koreio.

Konkludante sian paroladon, Ĉu Teh, membro de la Politika Buroo de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio, diris, "La venkoj en la Varsovia Kongreso kaj la venkoj sur la Korea batalokampo egale markas la altan tajdon de la lukto kontraŭ imperiismo, kaj egale meritas celebri. La Ĉina Delegacio al la Dua Monda Paco-Kongreso sciigis al la tuta mondo ke firme defendi mondpacon estas la sankta volo de la ĉina popolo. Ni celebras la sukceson de la Varsovia Kongreso kaj bonvenigas kaj dankas la membrojn de nia Delegacio."

Kaj reprezentante la firman volon kaj ardan deziron de la ĉina popolo en defendo de mond-paco, la Centra Popola Registara Konsilo en sia 10a kunsido 28. dec. 1950, aprobis rezolucion pri la dek proponoj de la Dua Monda Paco-Kongreso. La teksto de la rezolucio legiĝas:

"La Konsilo de la Centra Popola Registaro Opiniis ke la Mondpaca Programo kiel esprimata en la du historiaj dokumentoj—"La manifesto al la popoloj de la mondo" kaj "La Alvoko al la Unuigitaj Nacioj"—kiuj estis aprobitaj de la Dua Monda Paco-Kongreso tute konfirmas kun la volo de la ĉina popolo kaj la popoloj de la mondo. La Konsilo de la Centra Popola Registaro decidis plene subteni ilin kaj alvokas la ĉinan popolon daŭrigi siajn penojn por fortigi la ĉinan popoldemokratian diktatorcon, unuiĝi kun siaj internaciaj amikoj, disvolvi la justan kampanjon por rezisti Usonian, helpi Koreion, protekti niajn hejmojn kaj defendi nian patrolandon kaj batali por la plena efektiveco de la dek proponoj de la Dua Monda Paco-Kongreso."

Ni ripetis la lastan frazon de la Manifesto de la Dua Monda Paco-Kongreso: "Same ekagru registaroj de ĉiuj landoj, kaj tiel estos savita la kaŭzo de paco."

La debuto Fine de Oktobro 1950, sur la batalokampo en Norda Koreio, la ĉina popola volontula trupo batalanta kune kun la korea popolo, debute jam frakasis la atakon de la agresbanditoj de la Usonaj imperiistoj, kiuj, fanfaronis ataki Ĝis Jalu Rivero (鴨綠江) antaŭ "Thanksgiving Day", kaj devigis ilin konsternite retiriĝi al la sudo de Ĉongĉuan-Rivero.

La bravuloj de la volontula trupo gajnis la venkon per luktado kontraŭ la malamikoj armitaj ĝis la dentoj per aŭtomataj armiloj kaj firmataj de granda nombro da aeroplanoj, kanonoj kaj tankoj. La Usonaj banditoj en ĉio dependis de ŝtalo kaj pulvo. Eĉ por ataki monteton ili salvis centojn da obusoj. Tamen la decida faktoro de venko ne estas la armilo, sed la homo kiu la armilon uzas. Batalanto Vang Ju (王友) de la volontula trupo diris prave: "Aeroplano ne povas malsuprenveni por kapti homon, kaj kanono ne povas servi kiel bajonoto. Kiam venas tanko, tiam venas ankaŭ ŝaneo por fari heroaĵojn!"

De fragmentaj rakontoj pri la batalo de Vunsan oni povas vidi, kiel kuraĝaj kaj persistaj estas tiuj batalantoj kun alta batalasprito, kiuj venkis la Usonajn banditojn ĉiam pretendantajn pri siaj "bonaj armiloj".

Roto de la ĉina popola volontula trupo gardis sur monteto, 20 kilometrojn sudoriente de Vunsan. Kaj du rotoj de la Kavaleria Divizio de la Usona agresarmeo atakis tien. Senĉese bombardadis kaj maŝinpaŝadis. Neniam ĉesis la eksploda tondro sur la montpinto kiu restis kovrita de densa pulva fumo. La malamikoj eble kredis ke, eĉ se la bombardado ne trafis, ĝi almenaŭ perdigis al la gardantoj defendopovon pro la forta skuado. Sed la ĉinaj volontuloj en fortika ŝirmejo atente observadis la malamikojn. Ili diris: "Eĉ se ili batalos pli furioze, ili ne povos preni colon da nia batalpozicio!" La malamikoj kvinfoje sturmis sur la monteton, sed ĉiunfoje estas forpelitaj de la bajonetoj kaj grenadoj de la ĉinaj volontuloj, kaj forkuris postlasinte kelkajn kadavrojn. Post kvar tagoj kaj kvin noktoj, kvankam la aspekto de la montpinto ŝanĝiĝis pro la bombardado, la batalpozicio tamen restis firme staranta. En la heroa roto nur du batalantoj mortis kaj vundiĝis.

Tamen, kiam la volontula trupo atakis, la malamikoj frakasiĝis kiel kaduka arbo.

La 1-an de nov., de Jongdudong, sudoriente de Vunsan, roto de la volontula trupo faris atakon al malamika roto, kaj ekstermis ĝin. En la ĉina roto mortis kaj vundiĝis nur dudek personoj, dum en la malamika roto 18 personoj estis kaptitaj, pli ol 80 mortigitaj kaj vunditaj kaj la tuta roto ekstermita.

Eble tio tro humiligis la "elitojn" de la Usona armeo. La sekvintan tagon la malamikoj venigis 5 tankojn kaj 600 infanterianojn por rentako. Per aeroplanoj ili venis sur la monteton gasolenon kaj poste jetis brulbombojn. Ili faris la montpinton fajromaro kaj intencis tiel forpeli la ĉinan roton. Sed kiam la malamikoj sturmis supren, ili denove estis repelitaj de la bajonetoj de la ĉina trupo. Dum tri tagoj la malamikoj kaŝis sub la monto kaj ne povis fari eĉ unu paŝon antaŭen. Fine ili ne povis ne forkuri returne.

Kontraŭ tia ĉi rivalo, la Usonaj "herooj" kiuj povas sukcesi nek je ofensivo nek je defensivo,

havis nur unu rimedon: forkuril! Sed antaŭ la rapidemova volontula trupo tia plej bona rimedo ankaŭ senefikiĝis.

Kiam la roto kiu gardis sur la monteto, trovis ke komencis retiriĝi la malamikoj malsukcesintaj en sia atako, la ĉinaj batalantoj tuj atakis postkurante. Ili lerte kaj facilmove transiris kvar montojn kaj sturmis sur monton kie ne ekzistis malamika stabo. La malamikoj dormantaj sur la monto apenaŭ povis distingi kiuj venas, grenadoj jam eksplodis ĉe ili. Tuj malamikoj estis tiel timigitaj ke ili malsuprenluliĝis de sur la monto en anaspluma sako.

Alia roto senĉese pelis la forkurantajn malamikojn ĝis 20 kilometrojn malproksime ke la banditoj ne povas trovi eĉ peceton da tempo por organizi kontraŭatakon.

Batalanto Ĉang Ju-kjun (張友君) sola postkuris kun pafilo senkugla 5 Usonajn soldatojn, ili eĉ ne kuraĝis al li pafi.

Sur la batalokampo de Vunsan ĉio kuŝis kiel kadavroj Usonaj peztankoj kies sorto despli montras la mirindan kuraĝecon de la ĉinaj volontuloj. La 17-jara batalanto Lo Laang-se (羅亮澗) vundita enmetis du bombtubojn en radĉenon de tanko. Batalanto Vang Ju sola luktis kun tanko dum tuta horo. Antaŭ tiu senĉese kanonanta kaj maŝinpaŝanta tanko li kuris kvar fojojn inter ĝi kaj sia batalpozicio alportis grenadojn, eksplodadon, bombtubojn per kiuj li fine konkeris la kirasitan malamikon.

Vera oro fajron ne timas

De post la foriro el la patrolando la herooj ĉinaj volontuloj vivas kaj batalas ĉiam en tia situacio: Ili ofte faris longan marŝadon de 40-65 kilometroj en frosta nokto, sur krutaj montoj. Atinginte la celokon, plejofte ili dormis sur monto. Kiam ilia marŝado haltis, ili devis tuj fosi ŝirmejojn kiuj fariĝis por ili "leĝejoj" kovrita de rizopajloj kaj maizostipoj. Pajloj kaj stipoj ofte ne sufiĉis, kaj tial iuj devis tranokti en ili sub libera ĉielo, kaj mateno iliaj barboj kaj brovoj estis pudritaj de blanka pruĵo.

Ofte dum la batalado ili tutan tagon ne povis mangi, aŭ mangis nur unu fojon maizon. Ili englutis neĝon, ĉar akvo ne troviĝis sur montoj.

Sendube ĝi estas tre malfacila kaj mizora situacio ĝenerale ne elportebla. Sed la gloraj gefiloj de ĉina nacio ne nur elportis la malfacilojn sed ankaŭ ilin venkis. "Vera oro fajron ne timas!" "La ĉina popolo estas denaske malmola por venki ĉiujn malfacilojn kaj mizerojn!" En malfacilaj vivo kaj batalado la bravaj batalantoj de la ĉina popola volontula trupo ekiris tian vortojn.

Iu taĉmento ordonita por ekstermi la malamikojn ĉe Cosan, devis marŝi trans du mil metrojn alta monto sur kiu la transirado bezonas ok horojn. "Transiri la monton estas venko!" "Konkeri malfacilon signifas venkon!" Tiuj vortoj stimulis la batalantojn grimpai al la venko nokton post nokto.

Vang Sang-ĝing (王尚清) portis sur si ekipaĵon pezan je 45 kilogramoj kaj marŝis dum nokto 40 kilometrojn. Sur liaj piedoj estis 5 vezikoj pro la longa marŝado. Li tamen diris nenion kaj ne petis iun ajn porti la ŝarĝon anstataŭ li.

La montoj estis tre kruta ke la ŝarĝdevaloj ne povis iri. Tiam la kanonistoj maŝargiĝis la ĉevalojn kaj la kanonojn dismembriĝis kaj nem portis ilin sur siajn ŝultrojn. Malgraŭ ke la kanonoj prenis ĝis ŝveligo de iliaj ŝultroj, ili tamen sukcesis atingi la celon kaj ekstermi la malamikojn.

Dum la marŝado de iu roto al Tajĉun kvin malsanĝintaj batalantoj kune marŝis. Oni decidis ke ili ripozu por kelka tempo. Tio ilin plerigis.

(Daŭrigota sur p. 2)



(Daŭrigo de p. 1.)

Ili diris: "Ĝi rampi tien ni volontus!"
"Vi povas fari gloron por la patro-
lando, ĉu ni do ne povas?" Persiste ili
marŝis ĝis la celloko kaj partoprenis la
bataladon.

Sur la batalokampo tia alta entuziasmo
despli kulminis. La batalantoj kiuj
ofte manĝis nur unufoje maizon aŭ
terpomo-supon po tago, ĉiam preparis
kiel ekstermi la malamikojn kaj kiel
peti atakordonon.

Kiam iu bataliono estis komencanta
batalon, ĝiaj rotestroj kaj pelotono-
estroj kiuj petis ataktaskon plenis la
stabejon de la bataliono. Iu rotestro
men ĉe atendis sidante, kaj ne volis
foriri sen ricevo de ataktasko. Kiam
iu kaporalo kiu petis plurfaje de sia
roto ataktaskon, aŭdis ke lia grupo
estas organizita en la duan ŝtupar-
grupon, li tiel ĝagreniĝis ke li nenion
volis manĝi dum tuta tago. Grave
malsana roto-direktoro Ho Ĉeng-kjun
(何成君) sin apogante sur kuriero
iris en trenĉon kaj instigis en kanon-
tondrado la batalantojn: "Faru heroaj-
on por la patrolando!" "Venĝu la
korean popolon!"

Kaj en tiu roto aperis la heroo Vej
Tian-fu (魏殿福). Kuglo enpenetris en
lian maldekstran ŝulttron, sed li daŭ-
rigis sturmi al la malamiko; laŭ la
stato de lia vundo li devis iri al
bandaĝejo, sed li rampis sur tankon, per
sia bajoneto malfermis la kovrilon de la
tanko kaj mortigis la malamikojn en ĝi.

Vera oro fajron ne timas! Tuj
bonaj gefiloj de Ĉinio elmontris
gloran tradicion de necedemo kaj
persisteco de la ĉina popolo, kaj
konkerinte montojn kaj riverojn,
malsaton kaj froston, ili gajnis la
venkon kaj ekstermis la malamikojn.

La fonto de la forto. Usona kaptito
demandis al volontula batalanto: "Ĉi-
utage batalinte nur kelkajn horojn ni jam
vagos ripozi, kaj ni marŝas per aŭtoj.
Kial vi neniel ĝenigas nemanĝante dum
tri tagoj? Kial vi ankoraŭ povas sturmi
sub la bombardado de aeroplanoj tage
kaj nokte?" Li dubis, ĉu la ĉinaj bata-
lantoj estas "veraj homoj."

Jes, ni povas diri al li: Ili estas
homoj. Ili diferencas nur per tio, ke ili
ĉiuj estas grandaj batalantoj kun kapo
armita, kun patriotismo kaj internaci-
ismo de alta politika konscio.

La senlima indigno kiun kaŭzis al la
ĉinaj batalantoj la krimfaro de la
Usonaj imperiistoj agresi Koreion kaj
Ĉinion, estas la fonto de ilia forto per
kiu ili kreis heroajn miraklojn.

Vang Ju, kiu luktis unu horon kun
tanko, diris: "Pasinta-tempo, kiam la
japanaj diabloj okupis nian Nordorien-
ton, ĉu ili ne same okupis unue
Koreion? Nun invadante Koreion,
la Usonaj diabloj en sia koro jam
kalkulas pri nia Ĉinio! Se ne, kial ĝi
okupas Tajvan? Kial ĝi bombardis An-
tung (安東)? Ĉu estas eble ke ni ne
okdefendu la pordon de nia patro-
lando?" Antaŭ la aligo al la volontula
trupo li estis kamparano en Nordori-
enta Ĉinio. Li memoras ankoraŭ tre
klare: "Koreaj kamaradoj helpis nin
liberigi la Nordorienton. Ĝi-foje de
nia najbaro estiĝis bruligo, ĉu ni povus
apude rigardi ne donante helpon?"

La peza katastrofo kiun la agres-
armeo de la Usonaj imperiistoj alportis
al la korea popolo, despli grandigis la
malamon de la ĉinaj batalantoj al la
malamiko.

Dum la batalado sur batalokampo iu
grupo de ĉinaj volontuloj vidis la kore-
ojn mortigitajn de la bomboj de la Uson-
aj imperiistoj. Kun granda malĝojo
ili enterigis la kadavrojn kaj iris al la
politika direktoro por esprimi sian de-
cidon: "La korea popolo suferas tro
multel Ne eksterminte la malamikojn
ni ne hejnen iros!"

La firma volo batali por la patro-
lando kaj la korea popolo igis la ĉinajn
volontulojn fari tiajn heroajn, ke ili
venkis en tiel malfacila konkordo la
malamikojn amitaĵn ĝis la dento.

Estas nenio stranga la dubo de la
imperiistoj pri la heroajfo de la ĉina
popola volontula trupo montrita sur
la batalokampo de Norda Koreio, kiuj
estos por la avidaj, kruelaj, malkura-
ĝaj, kaj malsaĝaj malamikoj neniam
komprenblaj!

USONAJ MORTIGANTOJ

— Movado —

Kiu grajgis ja Ĉiang Kaj-ŝek, la hundadon?
Kiu per sesmil milionoj da dolaroj
Subtenis lian klikon? Kiu, ŝajnigante
Sin interpaciganto, kaŝdirektis en bataloj?
Kiu? Kiu? Kiu?
Ĝi estas la imperiismo agresema
De la Usonaj kanibaloj, sciul!

Kiu per tankoj kaj bazukoj⁽¹⁾ armis la Ĉiang-trupon
Por premsufoki la revolucion per komplotoj?
Kiu ja fondis la SACO-an⁽²⁾ koncentrig-tendaron
Kaj masakradis milojn kaj dekmilojn da patriotoj?
Kiu? Kiu? Kiu?
Ĝi estas la imperiismo agresema
De la Usonaj kanibaloj, sciul!

Kiu, dum la cent jaroj, iam malkaŝe subpremis
Nian revolucion forton per milit-manovro,
Tamen pli ofte songis ja narkoti la spiriton
De la popolo per veneno en sukera kovro?
Kiu? Kiu? Kiu?
Ĝi estas la imperiismo agresema
De la Usonaj kanibaloj, sciul!

Sur strat' en Kunming (昆明), sur sensona revolero-
Kaj en Ĉazetung (濟澤洞), Ĉungking sur katenoj rustaj
Ja klare gravurigis ĝia nomo aĉa
Kaj sang' makulis de sennombraj ĉinoj justaj.
Kiu? Kiu? Kiu?
Ĝi estas la imperiismo agresema
De la Usonaj kanibaloj, sciul!

Kiu de la malnovaj ŝuldoj ankoraŭ ne kvitas
Kaj novan ŝuldon ree kreas jam kun sangaj manoj?
Kiu etendas demon-ungojn en Nordorienton,
Invadas nian landon per frenezaj aeroplanoj?
Kiu? Kiu? Kiu?
Ĝi estas la imperiismo agresema
De la Usonaj kanibaloj, sciul!



Kiu la sangon de koreoj trinkas?
Kaj kiu trinkas la sangon de ĉinoj?
Kiu la sangon trinkas de la tuta mondo
Kaj ĉe de siaj samlandanoj kun obstino?
Kiu? Kiu? Kiu?
Ĝi estas la imperiismo agresema
De la Usonaj kanibaloj, sciul!

Kiu? Kiu estas la rabisto kiu rompas la mondpacon,
La kanajlo, kiu malhonoris niajn fratinojn per forto,
La ĉefa sangavida malamiko de la ĉina popolo
Kaj ŝtelisto kiu rampas serpente al nia pordo?
Tiu! Tiu!
Tiu imperiismo agresema
De la Usonaj kanibaloj, sciul!

Trad. S. J. Zee.

1. Bazuko: anglalingve bazooka, speco de kontraŭtanka bombardilo.

2. SACO: legu 'SAKO', mallongigo de 'Sino-American Cooperative Organization' (Ĉino-Usona Kooperativa Organizo)



INDUSTRIISTOJ KAJ KOMERCITSOJ EN LA MOVADO REZISTI USONON KAJ HELPI KOREION

Ekde lasta novembro la industriistoj
kaj komercistoj en diversaj urboj de
Ĉinio aktivigis en la movado rezisti
Usonian agreson kaj helpi al Koreio. Je
la 27a de lasta novembro pli ol 1,300
reprezentantoj de industriistoj kaj
komercistoj en Ŝanhajo okazigis
mobilizacian kunvenon por rezisti Usonian,
helpi Koreion, protekti siajn hejmojn
kaj defendi sian patrolandon. Kaj je
la 30a, pli ol 4,200 industriistoj kaj
komercistoj de Tienzino (天津) okazigis
manifestacion. Similaj manifestacioj
ankaŭ okazis en aliaj grandaj urboj
kiel Pekino, Harbino, (哈爾濱) Cing-
taŭ, (青島) Ŝian (西安). La movado
ankaŭ vigligis en la urboj Hankoŭ,
(漢口) Kantono, (廣州) Mukdeno (瀋陽)
kaj aliaj.

Tio montras ke la ĉinaj industriistoj
kaj komercistoj jam plene konas la
reakcian naturon de la invada milito
de Usono kontraŭ Ĉinio kaj Koreio.
Ili ne povas esti trompataj, nek timas
minacon sed decideme staras sur la
patriota pozicio de rezisto kontraŭ
Usono kaj helpo al Koreio. El la
ŝango de sia aktuala vivkondiĉo ili jam
komprenas la invadan naturon de la
Usona ekonomia politiko kontraŭ Ĉinio
en la pasinteco. Ekzemple Li Ŝu ĵen

(李樹人) de la Tienzina Sinmin (新民)
Cigaredfabrika diris: "Sub la reakcia
regado de Kuomintang, la merkato
pleniĝis de Usonaj cigaredoj. Plej-
parto el la 15 cigared-fabrikejoj ĉesis
produkti. La tuta produktokvanto de
la dua duonjaro de 1948 estis malpli
ol la nuna produktokvanto en unu
monato. Tial ni cigaredfabrikantoj
devas likvidi konton kun la Usona im-
periismo por efektiva ago." Li Vej-ji
(李威儀) de la Tienzina Ledfabrika
Sindikato diris: "Post la venko de la
Kontraŭjapana Milito, kelkcent mil
kilogramoj da Usona ledo dumpingis al
Tienzino. Niaj tricent fabrikejoj mal-
pliigis la produkton naŭdekprocente.
La plej granda fabrikejo produktis po-
tage nur 3 ĝis 5 foliojn da ledo. Post la
liberigo la produktivo realtigis kaj nun
la monata produktokvanto estas 100,
000 folioj. Ni ne permesas la Usonian
imperiismon reveni kaj detrui nian
prosperon."


Kaj la patriota indigno de la in-
dustriistoj kaj komercistoj efektiviĝis
en efika ago. Patriotaj kontraktoj
inter industriistoj kaj komercistoj
estas faritaj en dek tri grandaj urboj
inkluzive Ŝanhajon, Pekinon, Tienzino,
Kantonon, Mukdenon kaj Ĉungking

(重慶). Sub ĉi tiuj patriotaj kontraktoj
industriistoj kaj komercistoj juris
aldoni sian forton al la komuna batalo
kontraŭ Usonian agreso. Komuna bazo
de ĉi tiuj interkonsentoj inkluzivas la
jenon:

- (1) garantii sufiĉan provizon de
ambaŭ milita kaj civila bezonoj;
- (2) doni ĉian subtenon al la ĉinaj
popolaj volontuloj en Koreio.
- (3) garantii intiman kunlaboron inter
publike kaj private posedataj in-
dustrioj, kaj.
- (4) helpi firmigi la popoldemokratian
diktatorecon.

Tio montras ke la patriotaj indus-
triistoj kaj komercistoj en la tuta
lando, kune kun la popolamasoj, jam
ligigis en pli fortika kontraŭinvada
unueca fronto. Nia lando estas nov-
demokratia lando de komuna dikta-
toreco de unuigitaj kontraŭimperiismaj
klasoj. Ĝi tiu pli fortika patriota
unueca fronto el la laboristoj, kampar-
anoj, intelektuloj kaj industriistoj kaj
komercistoj montras ke la popoldemo-
kratia diktatoreco de Ĉinio pli fortiki-
ĝas, kaj kiel Prezidanto Maŭ diris:
"Tio montras ke la ĉina popolo fine
venkos en la kontraŭimperiisma sankta
batalo."

Ĉinaj Karboministoj



LERNOTABULETO EN KAMPARANA HEJMO

Ŝia feng (夏風)

17,000 POPOL-LERNEJOJ STARIGITAJ EN NORDĈINIO

La popola eduk-laboro en Nordĉinaj vilaĝoj disvolviĝas en senprecedenta grandskalo. Vastaj amasoj da terkultivistoj akiras ŝancojn por esti klerigitaj politike kaj kulture. Post la agrara reformo ili montras tiel urĝan postulon pri lernado ke la vintraj lernejoj ne povas plenumi ilian bezonon. En la lasta printempo, kiam la vintra-lerna movado finiĝis, tiuj vintraj lernejoj kun favoraj kondiĉoj kaj firma bazo estis konvertitaj en normalajn popol-lernejojn. De marto ĝis novembro, 1950, etariĝis pli ol 17,000 popol-lernejoj en la tuta regiono. En Pingjuan-Provinco (平原省) troviĝas la plej granda nombro da popol-lernejoj—entute pli ol 9,700. Tiuj nombro grandigis pli ol dekkvaroble de tiu en 1949 kiu estis nur 667. La lernantoj en tiu provinco superis la nombron de 350,000. La dua en la ordo estas Sansi-Provinco (山西), kie estas 6,100 popol-lernejoj. En Ĉangĉi (長治) Distrikto de tiu provinco ĉiu lernejo havas meznombre cent lernantojn kiuj ĉiam regule daŭrigas sian lernadon. La popol-lernejoj en plejmultaj lokoj jam fariĝas popolamasaj organizoj por lernado.

En Nordĉinio pli granda sukceso pri popol-edukado prezentigis en lasta jaro ol en ĉiuj pasintaj jaroj. Precipe la elementa edukado akiris plej riĉan rikolton. Post duon-jara lernado en la lernejo ĉiu terkultivistoj kapablas legi ĉirkaŭ 300 ideografojn kaj la gejunuloj ĉirkaŭ 500 aŭ 600. Rezulte de testoj okazigitaj en Liĉeng (黎城) kaj aliaj ses gubernioj de Sansi-Provinco, evidentigis ke proksimume 10,000 analfabetoj jam scipovas iam legi. Multaj terkultivistoj lernis skribi leterojn kaj kontrolojn kiel ankaŭ fari kalkuladon. Bonan sukceson ankaŭ havis propaganda edukado pri la registara politiko kaj nuntempaj okazintaĵoj. Dum la disvastigado de pas-subskriba movado la popol-lernejoj fariĝis konvenaj lokoj kie popol-amasaj diskutoj pri la okazintaĵoj aŭferoj. Tie la propagandaj laboroj multe plivigliĝas dum la nuna kontraŭ-usona kaj por-korea movado. Ekzemple kunvenoj okazis senĉese por multaj tagoj en 13 popol-lernejoj ekster la urbo de Kalgano (張家口). La virinaj lernantoj rapide kaj aktive esprimis sian volon kudi vestojn kaj ŝuojn por niaj volontuloj batalantaj en Koreio.

La alia rikolto kiun la popola edukado akiris estas la disvastigo de produkt-tekniko kaj scienca scio. Kiam dissemado komenciĝis en kelkaj gubernioj de Pingjuan-Provinco, tiaj produkt-teknikoj kiel preparado de hidrargaĵo kaj trempado de semoj en varma akvo estis instruataj en tiuj popol-lernejoj.

En la vilaĝo de Ŝiĉang-Gubernio (赤城縣) de Ĉahar-Provinco (察哈爾省) oni instruis en la popollernejoj pri la aplikado de speciala fekajo al speciala tero kiam la terkultivistoj komencis alporti fekajojn al la kampoj. En Ĉang ŝi-Gubernio de Sansi-Provinco, kiam hajlo kaŭzis damaĝon al la kampoj, la popol-lernejoj instruis al la lernantoj: "Por vivi oni devas peni, ve-krioj kaj bedaŭroj neniel helpas." kuraĝigante la terkultivistojn venki la katastrofojn kaj antaŭenpuŝante la laboron de resemado. Krome en multaj popol-lernejoj estas farataj ankaŭ klarigoj pri virina kaj infana higieno. Pro tio la lernejoj ricevas de multegaj popol-amasoj fervoran subtenon.

La agadoj en diversaj popol-lernejoj varias laŭ la speco de loka produktado en malsamaj sezonoj. En Vuan-Gubernio (武安縣) de Hopej-Provinco, kiam la terkultivistoj estis okupitaj pri siaj laboroj, lernado okazis nur en la tagmezo aŭ vespero. Dum tia periodo, en kelkaj vilaĝoj la lernado daŭrigis pere de "malgrandaj instruistoj" (t. e., junaj geknaboj kiuj scipovas legi) kiuj iris instrui en la kampoj. En Multaj lokoj en Sansi-Provinco la viroj portis siajn lernolibrojn kun si al la kampoj kaj la virinoj al la kuirejoj. En la pasinto oni diris: "Neeble estas lerni dum laborezo en la kampoj" sed nun oni diras: "Lernu kiam ajn vi havas tempon." En la vilaĝo Ĉentoŭ (岑頭) de la sepa distrikto de Anĵang-Gubernio (安陽) Pingjuan-Provinco, la grandaj popol-

lernejoj estas dividitaj en malgrandajn popol-lernejojn kaj la lern-grupojn ligitas kun la interhelp-grupoj. Ĉiuj persistas je sia regula lernado, neante la pasintan diron: "Novjaro ĉesigas vintran lernadon, kampa okupateco fermas popol-lernejojn."

Kion signifas liberigo por la ĉinaj laboristoj ĝenerale, kaj por la 450,000 karboministoj aparte? Preskaŭ ĉiu karboministo, kiun vi renkontas, povas senhezite respondi al vi per aro da komparoj.

Tri rimedoj last jare de la Centra Registaro aplikataj montras klare la novan vivon de la ĉinaj karboministoj sub ilia propra reĝimo. La unua estas la nuligo de la band-labora sistemo,* kiu dum la pasinteco rabis de la ministo tiel multe kiel 80 procentoj de lia espezo. En la nuna tempo, tiu sistemo estas efektive nuligita en ĉiuj ŝtatoj posedaj karbo-minejoj. Ne plu sklavoj de bandmastroj, la karbo-ministoj nun jam estas, laŭ sia politika stato, inter la plej respikindaj laboristoj en nova Ĉinio, pro sia superega graveco en la industria rekonstruado de la lando. Ĉiu karbo-ministo havas la rajton partopreni la administracion de la ŝtataj minejoj pere de sia sindikato. De la Ministerio de Hejtajo-Industrio ĝis la plej eta ŝakto, la direktantaro devas konsultiĝi kun la ministoj pri la problemoj de produktplano kaj aliaj gravaj problemoj. Plue, miloj da malalt-rangaj ministoj estas jam promociitaj al administrataj pozicioj, inkluzive tiujn de direktoroj.

La dua rimedo estas reformo de la malprogresemaj minmetodoj: Por dekoj da jaroj, ĉinaj ministoj devis labori sub la plej primitivaj produktmetodoj, simple uzante sian fizikan forton. Ĉiujare en multaj ŝtataj minejoj la apliko ad maŝinoj-kaj minadistemoj

jam longe utiligitaj en novmodaj minejoj en aliaj landoj, grande malpezigas la laĉigan laboron de ministoj kaj malgrandigas la eblecon de danĝeraj okazoj.

La tria ŝanĝo estas la radikala plibonigo de sekureca kondiĉo en la karbominejoj. En la pasinteco, la imperistoj aŭ burokrataj kapitalistoj kiuj posedis la minejojn neniam prizorgis pri la vivo de la ministoj. Inundo, gaseksplodiĝo aŭ disfalo de galeritegmentoj estis rigardataj kiel banalaj. La vivo de ministo, estis pli malkara ol tiu de hundo. Vundoj kaj mortoj inter la ministoj ofte sumiĝis po centoj en unu akcidento. Ekde la liberigo, la Popola Registaro elspezis grandan sumon por plibonigo de ventolado kaj sekurecaj faciligaĵoj. Samtempe, oni klopodas por disvastigi sekurecan edukon en la flanko de la ministoj mem. Multaj laborbrigadoj sin distingis kiel modelaj sekurecaj brigadoj pro laborado sen iu ajn akcidento dum la tuta jaro. Propecio en mortakcidentoj malpliigis je tri kvaronoj en la dua jarvarono de la lasta jaro kompare kun la unua.

Kune kun tiuj ĉi reformoj alvenis rimarkebla altiĝo de entuziasmo por produktado. Miloj da modelaj ministoj jam aperis kun elstaraj atingoj en teknika plibonigo, multigitaj produktoj, redukte de akcidento-proporcio kaj malaltiĝo de produktokosto. Laborproduktiveco en ŝtatindejoj nun grande superas tiun sub Kuomintangaj kaj

paroladojn. Tio solvis la problemon pri nesufiĉo de instruistoj. En tiuj vilaĝoj oni lernas dum la mateno kaj instruas dum la posttagmezo, aŭ gedzaj kaj gefratej instruas unuj al la aliaj. Tiamaniere la popol-lernejoj fariĝis grandegaj popol-amasaj lern-organizoj. La divers-lokaj popol-lernejoj ankaŭ okazigas periodajn ekzamenojn kaj lern-resumajn kunvenojn kaj donas publike laŭdojn al modelaj lernantoj por intensigi la interon en lernado de la lernantoj kunordigitaj kun la kontraŭ-usona kaj por-korea movado. En ĉiuj popol-lernejoj nun okazas duonjaraj lern-resumoj kaj ĉiuj estas pretaj por komenci grandskale vintra-lernan movadon.

Esp-igis I. K.

Kunlaboru Tutmondaj Esperantistoj!

Traduko, represio, resumo kaj ĉiumanieraj utiligoj de materialoj en nia bulteno estas pormesataj kaj bonvenaj, kondiĉe ke ili ne estos malice kripligitaj kaj la utiliginto plenumos niajn jenajn petojn:

- 1) Post la traduko, represio, resumo aŭ aliaj utiligoj rimarki aparte el kiu numero de nia bulteno ĝi estas tradukita ktp.
- 2) Sendi al ni 4 ekzemplerojn de la traduko, represio aŭ resumo kaj sur ili noti el kiu numero kaj kiu artikolo ĝi estas tradukita ktp.
- 3) Sciigi al ni kia estas la ĵurnalo aŭ gazeto, sur kiu aperis la traduko, represio, aŭ resumo kaj, se eble, kiom da legantoj ĝi posedas.

Se iu el vi, karaj samideanoj, interesiĝas pri Popola Ĉinio, bone utiligas niajn materialojn kaj volas pli multe informiĝi, sciigi al ni vian bezonon kaj ni volonte vin provizas laŭeble. "Plej bona propagando estas praktiko". Estas jam tempo por antaŭenpuŝi nian movadon al pli alta stadio ol nur propagandi. Kunlaboru, ĉiuj esperantistoj tra la tutmondo!

La Red.

Ĉinaj Kristanoj Kontraŭ Imperiismo

Kristanismo estas longe utiligata de la imperiistoj kiel ŝtaka ilo por invadi la t. n. neprogresajn landojn. Post la liberigo de Ĉinio la ĉinaj kristanoj publikigis manifeston sub la titolo *La Vojo de Ĉinaj Kristanoj en la Konstruado de Ĉinio*. En ĝi ili klare esperimis la volon subteni la Komunan Programon, batali kontraŭ la imperiismo, feŭdalisimo kaj burokrata kapitalismo kaj klopodi por la konstruo de sendependa, demokrata, paca, unuigita kaj potenca Ĉinio. La manifesto estas vaste akceptita kaj dank' al ĝi disvastiĝas la movado deŝiri ĉiajn rilatojn kun la imperiistaj landoj ĉu en organizo ĉu en financa subteno ĉu en propagando. Tiu manifeston jam subskribis ĉirkaŭ 80,000 kristanoj. Precipe en kontraŭagresa batalo kontraŭ Usono la subskribo pli bone disvastiĝas kaj en multaj lokoj, ekzemple en Kantono (廣州) kaj Hangĉoŭ (杭州) la kristanoj anoncas ankaŭ sian patriotan konvencion kontraŭ la agreso de la Usona imperiismo. Tiu de la Hangĉoŭaj kristanoj tekstas jene:

- 1) Subteni la Komunan Deklaracion de la Ĉinaj Demokratiaj Partioj kaj batali por ĉiuj fortoj kontraŭ la Usona agreso por defendi la partolandon,
- 2) Diligente lerni la politikon por forigi la influon de imperiismo kaj disvastigi la patriotan propagandon,
- 3) Malkaŝi kaj subpreni la intrigon de imperiismo kaj ĝiaj spionoj,
- 4) Subteni la malpemeson de la registaro al la reakciaj superstiĉaj organizoj,
- 5) Obei la leĝon de la registaro kaj subteni la agraran reformon,
- 6) Bone efektiviĝi la entreprenon por publikaj bonoj kaj serioze servi al la popolo.

Havas Novan Vivon

japana regadoj. Produktokosto jam malaltigis je 15 ĝis 20 procentoj en la antaŭlasta jaro kaj rezulte, okazis ĝenerala redukto en prezo de karbo tra la tuta lando ekde la lasta septembro. En Norda Ĉinio, la malaltigo estis 24 procentoj. Tio ĉi estas elstara praktika kontribuo de ĉinaj karboministoj al la industriigo de ilia patrolando.

Salajroj de karboministoj, kiuj en la pasinteco estis la plej malaltaj, jam ĝenerale altiĝas je 15 procentoj dum la lasta jaro; krome, ne plu ekzistas la forrabado de la bandomastroj. Fakte, ministoj antaŭe gajnis apenaŭ sufiĉe por sin vivteni por daŭrigi la laboron, kaj nutrigo de familianoj estis ekster la demando.

Nun, ordinara ministro kapablas vivteni familion de kvar homoj per sia salajro. Plue, multaj minejoj nun provizas senpagajn loĝejojn por la ministoj. En la Nordoriento, plano por grandakala demkonstruado apud la karbominejoj estas plenumita de la Registaro. Novaj banejoj, kantinoj, kluboj, kuracejoj kaj kooperativoj estas almetitaj al tiuj ĉi nove konstruitaj kvartaloj por ministoj.

La nova labora asekura regularo, kiu jam funkcias en la Nordoriento kaj estos efektiva tra la tuta lando ĉi tiun jaron, forigas la antaŭe profunde radikigitan timo de la ministoj koncerne maljunaĝo, malsaniĝo, kripliĝo aŭ morto. Eĉ nun, plej-

parte el la ministoj en la alia parto ĝuas la rajton provizatan en la asekura regularo. Ekzemple, ili rajtas havi senpagan kuracoon kiam ili malsaniĝas. La Registaro jam komencas starigon de ripozejoj kaj sanatorioj por ministoj. Unu el tiuj situacias ĉe la bonkonata somera vizitejo Ĉinhuangtaŭ Hopej-Provinco.

Kiel la ceteraj laboristoj en Ĉinio, la ĉinaj karboministoj longe estis senigitaj je la rajto de eduko. Okdek procentoj el ili estis analfabetoj aŭ duon-analfabetoj je la tempo de liberigo. En la lasta jaro klerigaj kursoj estas okazigitaj en plejparto de la minejcentroj. Laŭ statistiko pli ol 70,000 ministoj jam partoprenas tiujn kursojn dum siaj postdejaraj horoj. La registaro celas al kompleta forigo de analfabeteco inter la ministoj en la sekvontaj unu aŭ du jaroj. Sportoj kaj aliaj distraj aktivoj ankaŭ rapide disvolviĝas inter la ministoj. La ĉina ministro ne plu ekzistas kiel besto de ŝarĝo. Li rapide kreskas al la plena staturato de politike-konscia matureco.

Censinio

**Bund-labora sistemo estis sistemo de feŭda subpremo. La bund-nastroj kontrolis laborprovizon por la minejoj, difinis horojn kaj kondiĉojn de laboro kaj forrabis parton de la salajro de la laboristoj.*

Laboro de Patrinoj kaj Infanoj sano En Pekino.

12 sanitaraĵoj centroj de Pekino estas tre popularaj lokoj. Tiu, kiun mi vizitis ĉi-posttagmeze, en la orienta parto de la urbo, estis plenigita de patrinoj kaj infanoj atendantaj en la varmaj ĉambroj por sanekzameno aŭ kuracado. Tiu ĉi estas la centro de sanokonserva retajo por patrinoj kaj infanoj en tiu ĉi dense loĝata parto de la urbo. Ĝi estas parto de la urboskala sanitara sistemo, kiu nun ebligas preskaŭ ĉiujn akuŝantinojn kaj iliajn infanojn ĝui modernan medicinan zorgon.

"La laboro por patrino kaj infano bonfarto en tiu ĉi parto de la urbo rapide progresas," diris al mi la Doktorino Ĉang, (張) kiu estas gradigintino de la Medicina Kolegio de Jenĉing-Universitato (燕京大學). "Ni povis malmulte progresi ĝis Pekino estis liberigita," ŝi diris. Tiu ĉi retajo de sanitaraĵoj centroj estas funkcianta jam de pli ol 20 jaroj por tiu malgranda grupo de akuŝantinoj kiuj povis pagi altajn kostojn. La ceteraj nur povis esti zorgataj de malmovtipaj akuŝistinoj kies malpuraj manoj kaj superstiĉa "ĥirurgio" kaŭzis morton de senombraj patrinoj kaj infanoj ĉi-jare.

Post monatoj da giganta penado de la sanitara centro, aktive subtenata de la urba registaro kaj la loka virina unuigo, nur ok procentoj de akuŝantinoj ankoraŭ uzis needukitajn, malmovtipajn akuŝistinojn en oktobro, kaj pli ol naŭdek procentoj de novnaskitoj estis vakcinitaj kontraŭ variolo anstataŭ la antaŭaj kvindek procentoj.

La doktorino diris al mi ke brava plano estis jam desegnita por eduki la

malmovtipajn akuŝistinojn per modernaj metodoj.

"La sukceso de patrinlaboro ne estas facile akirebla," diris al mi Doktorino Ĉang.

Unue, la sanitara centro alvokis kunvenon de modernaj akuŝistinoj kaj kuracistoj kaj diris al ili la neceseco ilin organizi kaj popularigi akuŝarton kaj infan-zorgon inter la lokaj virinaj loĝantoj. Tiu ĉi propono ili entuziasme konsentis, ĉar ĝi povus grandigi iliajn klientarojn.

Due, la sanitara centro funkcias en kvar grupoj por zorgi akuŝon de ĉiuj akuŝantinoj en la distrikto.

Malgranda estis la progreso komence, ĉar la akuŝistinoj ankoraŭ postulis troajn pagojn. Plie, iliaj metodoj estis ne tre bonaj kaj al ili mankis ĉe la plej simplaj medicinaj instrumentoj. Tiam, la sanitara centro malformis kursojn por helpi al ili kritiki iliajn metodojn. Malfermis por ili ankaŭ politikaj kursoj por disvolvi la vidpunkton "servi al la popolo."

Tiu ĉi teoria studado kunigita kun praktiko multe plibonigis ilian laboron kaj pli kaj pli da akuŝantinoj postulis modernajn metodojn por la akuŝo. Samtempe la pagoj estis plimalaltigitaj ĝis modera nivelo, ke ĝi estas malpli ol unutaga salajro de nesperta laboristo kaj por tiuj, kiuj ne povis pagi tiom, la registaro respondecas la pagon.


Sub tiu ĉi sanitara sistemo, akuŝantino ricevas medicinan zorgadon de la plej

frua etapo, de gravedigo ĝis kaj post la akuŝo ĉu hejme ĉu en hospitalo. La sanitara centro kaj ĝiaj grupoj ofte faras antaŭnaskajn ekzamenojn por eviti malfacilan naskon, por malebligi akuŝan febron, tetanon, variolon, difteriton, tuberkulozon.

La grupoj ĉiunonate raportas al la sanitara centro pri sia laboro. Samtempe, la sanitara centro sendas medicinajn spertulojn al la grupoj por helpi ilin en antaŭ-naskaj ekzamenoj, kaj en malfacilaj akuŝoj. En pli malfacilaj kazoj, la akuŝantino estas sendita al la sanitara centro aŭ al hospitalo por zorgado.

La sanitara centro sendas kuracistojn kaj akuŝistinojn al la stratoj por doni popularajn paroladojn pri la avantaĝo de moderna akuŝarto kaj patrino kaj infana higieno. Tiujn ĉi paroladojn aŭskultas ĉiam granda nombro da patrinoj. Tiamaniere la akuŝistinoj kaj kuracistoj kunigas sub la gvidado de la sanitaraĵoj centroj en komuna klopodo por gardi la vivojn kaj bonsanon de la patrinoj kaj infanoj de Pekino.

HOWENS.



LA DOKTORINO KLARIGAS AL LA PATRINOJ KIEL PRIZORGI INFANOJN

KVANKAM MI ESTAS AĜA

Rakonto de 59-jara Virino Vu Ŝu-Kie (吳淑潔)

Mi estas 59-jara ĉijare, kaj estos 60 en la venonta printempo. Vel! Kiom da malfeliĉaĵoj mi jam travivis. Ekz., dum la tempo sub Kuomintang regado post la kapitulaco de la japanaj diabloj¹⁾, oni pensis, ke ĉio fariĝos bona kiam revenas la ĉinoj, sed malgajaj okazaĵoj eĉ plimultigis. Prava estas la diro: "Kun sopiro, kun espero, la Centran²⁾ ni atendis de mateno ĝis vespero." Sed fine al ni ĝi alportas nur plimulte da sufero!" La Kuomintangaj reakciuloj estis pli tiranaj ol la diabloj. Ili forrabis la virojn kaj perfortis la virinojn, kaj senbride faris ĉiajn fiaĵojn. Per la tiel nomataj "oraj juanoj"³⁾, ili kaŭzis mizeron al la popolo. Tiam, du el miaj filoj laboris, sed ĉiama monata salajro eĉ ne sufiĉis por aĉeti kvar sakojn da faruno. Kiel mi vivtenis mian tutan familion de sep aŭ ok buŝoj per tiom malmulte da monol Piminte la tagan manĝon, mi devis zorgi pri la vespera. Kaj tio ankoraŭ ne estis ĉio. Dum la tri jaroj de ĝia regado, daŭris perforta konskripto de soldatoj. Tiuj fiuloj ja ne estis homoj. Ĉu tage, ĉu nokte, ni ĉiuj vivis en ĉiama teruro, timante ke la filoj estos forrabataj. Nenio helpis, vi devis pagi la konskripto-imposton, eĉ se vi havas nenion por manĝi. Tamen, tio ankoraŭ ne sufiĉis. Iun tagon, la centfamiliestro⁴⁾ venis kaj nin informis: "Via filo estas lote elektita," kaj ankor-

aŭfoje mi devis pagi. Vivi ja estis malfacile.

Same kiel al la steloj, kaj al la luno, ni sopiris al la liberigo de Pekino, kaj finfine nia sopiro efektiviĝis. La veraĵ ĉinoj alvenis. Kvar el miaj filoj jam havas laboron, du pagitaj laŭ la salajra sistemo, kies salajro estas sufiĉa por dek sakoj da faruno, kaj la aliaj du, armeaniĝinte pagitaj laŭ la proviza sistemo.⁵⁾ Mia plej juna filo nun lernas en lernejo. Ne plu estas bezonate ĉiam prizorgi manĝon kaj vestojn.

En mia kvartalo mi estas elektita sanitara laboranto. Ekde decembro lastjare, mi eklernis de vespera kurso de la kulturcentro. Iuj diris: "Homo jam duone enterigita, por kio ankoraŭ utilas la lernado!" Sed mi persistis kaj lernadis. Antaŭe mi konis neniu ideografon. Ho, kiom mi suferis pro tiol! Eĉ mallongan letereton mi devis peti alian legi por mi. Nun mi jam povas skribi 800 ĝis 900 ideografon. Mi skribis al miaj filoj ke nun ni vere liberigis, kaj ke ili bone laboru ekstere, ĉar tio ankaŭ estas por ni mem. Miaj filoj skribis ke mi ja progresas. Mia bonfarto, veninte el Dajren al Pekino por kunveno, diris al mi: "Kara bonfratino, mi esperas ke vi klopodas akiri permescon aliĝi al la Partio." Mi diris:

"Kvankam mi estas aĝa, tamen junas ankoraŭ la koro. Mi scias ke miajn bonajn tagojn alvenigis Prezidanto Maŭ. La Ĉina Komunista Partio estas nia savinto. Mi certe ĉiam sekvos la Partion." Mi ne scias multe paroli, sed mi bone scias ke Prezidanto Maŭ estas bona, ke la nuna registaro estas nia propra. Tio ja malsamas ol antaŭe, tute malsamas.

Trad. Ĉ. J. Zeng

- 1) La invadantaj japanoj.
- 2) La Kuomintang reĝimo simonis la Centra Registaro.
- 3) Dum la lastaj tagoj de sia regado, la Kuomintang registaro freneze ekspluatis la popolon per senlima eldono de bankbiletoj. "Ora juano", kun supozita rezervo estis unu el la specoj de tiaj rapide malplivalorigantaj bank-biletoj.
- 4) Sub la reŝicia regado de Kuomintang por faciligi la subpremon kaj ekspluatadon kontraŭ la popolo, la loĝantaro estis dividita en unuojn de dekfamilioj estrataj de dekfamiliestroj, kaj dek dekfamilioj faris centfamilion estratan de centfamiliestro.
- 5) Laborantoj en la registaraj oficejoj aŭ en la Popola Armeo estas rekompencaj, per disdono de ĉiutagaj necesajoj, inkluzive de manĝaĵoj, vestaĵoj, ktp.

Laboristo-Inventisto Ju Ĉen-san

Ju Ĉen-san (于振藩) naskiĝis en la vilaĝo Vuan, (武安) Ĉingjano-gubernio (清苑縣) de Hopej-Provinco. Li estas el familio de malriĉa kamparano, jam 44-jara ĉiare. Pro malriĉeco li ekvizitis lernejon malfrue en sia 14-a jaro kaj perlaboris en lernejo sian lernokoston. Jam tiam li forte interesiĝis en aritmetiko kaj ekhavis la intencan fari inventon por faciligi kalkulon, kiel li diris:

"Lerni adicieron kaj subtrahon estas ankoraŭ facile, sed multipliko kaj dividado ja estas tro konfuzaj kaj necesigas multe da memorlaboro. Pro tio, mi volas elpensi novan simplan metodon."

Kiam li estis 19-jara, li iris al Nordorienta Ĉinio. Tie li vidis multegajn maŝinojn, kiuj plaĉegis al li; laborante li detale skizis la maŝinojn kaj studis entuziasme.

Post la eksplodo de la "Akcidento de 18. Septembro," li devigite revenis hejmlokon de la Nordoriento kaj perdis ĉiujn skizojn kiujn li kolektadis diligente dum la pasintaj kvin jaroj. Tamen tio ne lin malkuraĝigis.

Baldaŭ poste, li trovis duan objekton por studo: li komencis esplori la "lignan bovon kaj aŭtomatan ŝevalon" rakontatajn en la fama historia romano "Tri Regnoĵoj."

"La artefarotaj bovo kaj ŝevalo estas laborantaj—li pensis en si—kaj konsumantaj nenian furagon. Kiel grandega kontribuo tio estos al la laborpopolo!"

Kun tiu ĉi celo, li komencis lerni la metodon de ĉarpentisto.

Post kvin jaroj da malfacila penado li ellernis la metion ĉarpentistan, tamen lia studo pri la fabrikado de aŭtomata besto malsukcesis. Sed la ellernado de ĉarpentista metio donis al li bazon por studi la novan metodon de kalkulo kaj novajn kalkulilojn. Post kiam li revenis de la Nordoriento, la vilaĝanoj ofte petis lin kalkuli terareon. Ĉar la kalkulo estas kompleksa, sekve, despli li sentis la urĝan neceson de simpla metodo.

Kaj ekde 1936 li komencis la esplorado en la libertempo de la kamparano. Li sin kaŝis en sia domo en kiu amasiĝis lignaj mezuriloj, lignaj tabuloj, papero, kraĵono kaj diversgrandecaj dentradaj. Li daŭre cerbumis kaj pene provis. Por eviti alies interrompon, ĉiam li sin ŝlosis en sian ĉamburon. La najbaroj ne povis diveni pri kio li sin okupis tagon post tago.

Foje okazis "bala batalo" de japanaj trupoj. Ĉiuj rifuĝis en kavernojn kunportante siajn valoraĵojn. Sed li forfuĝis kun lignaj liniloj, dentradaj kaj provfaritaj kalkuliloj.

En la daŭro de esplorado multaj vilaĝanoj ofte lin mokis kaj ironie diris:

"Ĉu tia kampara ĉarpentisto, kia vi, nek vizitinta universitaton, nek estanta matematikisto, revas esplori novan kalkulan metodon? Tio ja estas vana klopodo! Nek grandaj sciencistoj tra la tuta mondo, nek saĝuloj tra ĉiuj pasintaj generacioj povis elpensi ian metodon; ĉu vi, per via simpla kapo, kapablis tion fari? Hm!"

Tamen tiaj mokoĵoj lin neniom malkuraĝigis, sed male des pli fortigis lian firman volon.

En la unuaj kvin jaroj li elfaris

"lignan kalkulilon," tamen por nesufiĉo de teknikaj kaj materialaj kondiĉoj, ĝi ne povis tre bone kontentigi la bezonojn.

Kaj pene kaj diligente li laboradis plu, spertinte nekalkuleblajn malfacilaĵojn kaj malsukcesojn, suferinte senombrajn dolorojn kaj mokoĵojn kaj unu tagon en aprilo 1947 dank' al sia firma fido, granda decidemo kaj persistema peno, finfine li efektivegis sian volon kaj sukcesis krei kalkulan metodon per mezurilo.

Unue li elfaris "Kvadratan kalkulilon" kaj sur kies bazo li sinsekve faris "longforman kalkulilon" kaj "rondan kalkulilon." Per ili oni povas fari adicieron, subtrahon, multiplikon, dividon, kvadratingon, radikigon, areokalkulon, pezokalkulon, interkalkulon de malsamaj unuoj kaj proporcionalokalkulon, sen ia ajn memorlaboro, tre simple, rapide kaj facile. Ordinariaĵoj homoj sen scio de matematiko povas ellerni tiun metodon en du aŭ tri horoj, kaj solvi problemon dum kelkaj sekundoj. Ju Ĉen-san nomis sian metodon fulmrapida mezurilkalkulado."

En la komenco, kiam li klarigis sian metodon al aliaj, li ne povis ilin konvinki. Ili diris: "Nenio nova! Li nur memoras la nombrojn!"

En aprilo de 1947, li estis invitita al la gubernia registaro de Ĉingjano. Iu unuo de la Popola Liberiga Armeo invitis lin por instrui la kalkulmetodon al la kadroj. Ankaŭ diversaj institucioj kaj lernejoj venis lin por klarigi la principon de la kalkulo. Poste la armeunuo prezentis la novan metodon al la Registaro de Ŝansi-Ĉahar-Hopeja

Limregiono (晉冀察邊區政府) por esplorado. Post multfojaj provoj estis pruvite, ke la kreaĵo de Ju estis efektive nova metodo de kalkulado. Multaj vilaĝkadroj, armeanoj kaj laboristoj ŝparis multe da tempo kaj solvis multe da malfacilaĵoj dank' al la kreaĵo de Ju Ĉen-san. Lia kalkulmetodo estas ne nur simpla kaj facilernebla, sed kontentigas praktikan bezonon. Por kuraĝigi tian kreadon kaj disvastigi la novan metodon, la registaro (en decembro de la sama jaro) premiis lin per honor-mencio kaj 500,000 juanoj (ĉina monunuo) kaj baptis la novan metodon "Mezurila Kalkulado de Ju Ĉen-san" kiu estis redaktita de kamarado An Ven-huj (安文輝) en libron kaj eldonita de la Novaĉinia Librejo (新華書店). Ekde tiu tempo daŭrigis la esplaron sub la helpo kaj kuraĝigo de la popola registaro.

Por disvolvi lian genion la popola registaro rekomendis lin al Pejĵang-Universitato, (北洋大學) ke li lernu kaj daŭrigu la esplaron.

Viziti universitaton por la laboristoj ja estis neimageble en malnova socio. Nur kiam la regpotenco estas en la mano de la popolo sub la gvidado de kompartio la krea talento de la labora popolo povas senmalhelpe disvolviĝi.

En la universitato, Ju kune kun siaj kamaradoj organizis "Asocio de Mezurilkalkulado de Ju Ĉen-san" kiu unuflanke helpas Ju-oni la fundamentajn regulojn de matematiko kaj aliaj sciencoj kaj aliflanke vastigas la tajdon de kultura heredo kaj kunstudadoj. Kelkaj profesoroj kaj

asistantoj ankaŭ vicigis en la organizon, kiu sin okupis en la plibonigo de la rinda kalkulilo, samtempe en la pliriĝigo de la libro "Mezurilkalkulado de Ju Ĉen-san."

Lastatempe Ju akiris novan sukceson. Li aldonis "mezurilon kun reverza nombraro" sur la kvadrata-kalkulilo. Per tiu kalkulilo oni povas solvi en unu fojo ne nur problemojn de sinsekva kalkulado de multiplikoj kaj sinsekva kalkulado de dividadoj, sed ankaŭ parton de problemoj pri funkcioj en trigonometrio, ekvacioj en algebro kaj ebena geometrio kaj problemojn en agromezuro. Per unu ekmovado de la mezurilo solviĝas tuj tia problemoj. Tamen Ju Ĉen-san tute ne kontentigis pri siaj sukcesoj, sed daŭrigas sian studadon por kontentigi la bezonojn de la popolamasoj.

Ne komprenante superan matematikon, kaj ne havante la bazan scion de sciencoj, Ju Ĉen-san tamen elpensis novan kalkulmetodon konforman al la matematika teorio. Guste tiu estas pruvo, ke la laboramasoj ja havas senliman saĝecon kaj grandan kreaĵon. Samtempe tio ankaŭ montris ke sen bazaj sciencaj scioj la laboristoj kaj kamparanoj devas iri zigzagan kaj malfacilan vojon dum sia studado. Nur sub la helpo de la registaro kaj progresemaj inteligentuloj, kiam ili estas armitaj de scienca scio, ilia genio povas disvolviĝi senlime kaj libere. Vu Ven-pin

*La eksplodo de la invada milito de Japanio al Nordorienta Ĉinio en 1931.

Legu la plej bonan gazeton

INTERNACIA KULTURO

se vi volas scii la kulturen kaj socian vivon de popoldemokratiaj landoj, se vi volas partopreni la batalon por defendo de la mondopaco! Ĉion adresu al ĝia administracio: Sofio, str. Tri Uŝi n-ro 15, Bulgario.

ĈINAJ ESPERANTISTOJ BONVENIGIS KULTURAN DELEGITARON DE ĈEĤOSLOVAKIO

Lastatempe en Pekino la plej ŝatataj gastoj estas la Kultura Delegitaro de Ĉeĥoslovakio. Ĝi vizitis multajn kulturajn organizojn kaj interŝanĝis spertojn pri la kulturaj laboroj. Je la 2-a de januaro, la Ĉina Esperanto-Ligo ankaŭ aranĝis akcepton por ĝin bonvenigi. Ĉar la ĉinaj esperantistoj kaj la ĉeĥaj esperantistoj estas intime ligitaj en la celado akceli la kulturen interŝanĝon inter ĉi tiuj du landoj kaj la kunlaborojn por pabatalo.

La akcepto okazis en la muzika saloneto de la Kultura Klubo de la Tutlanda Komitato de la Popola Politika Konsilia Konferenco kun ĉeesto de 22 Pekinaj esperantistoj.

Venis ĝustatempe niaj honoraj gastoj Profesoro Jaroslav Prušek, la ĉefo de la delegitaro, prezidanto de la Ĉeĥoslovaka-Ĉina Asocio kaj Prezidanto de la Praga Orienta Instituto, Doktoro Zdenek Hrdlička, sinjoro Walter Stamberger kaj ilia Sekretariino Doktorino Venceslava Hrdličková.

Unue kamarado Ŝ. Ĉen je la nomo de la Ĉina Esperanto-Ligo bonvenigis kaj esprimis estimon de la Pekinaj esperantistoj al la delegitaro kaj prezentis al ili ĉiujn donacojn de la Ĉina Esperanto-Ligo inkluzive de Esperantaj pacinsignoj, la Elektitaj Verkoj de Ĉinaj Artistoj. Kolekto de Ĉeĥoslovakaj Noveloj kaj Kolekto de ĉeĥoslovakaj



LA 1A, 2A, 4A, 6A SIDANTOJ DE MALDEKSTRE EN LA UNUA VICO ESTAS LA KULTURAJ DELEGITOJ DE ĈSR. DOKTORO J. PRUŠEK SIDAS MEZE

Poemoj. Ambaŭ la lastaj du libretoj estas tradukitaj el la esperanta eldono de Ĉeĥoslovakia Antologio kaj en la Elektitaj verkoj de Ĉinaj Artistoj troviĝas klarigo Esperanta. Poste kamarado Hujuez, la estro de la Centra Eldona Administracio kaj pioniro de la ĉina Esp-movado, parolis pri la malfacilo de kultura interŝanĝo de niaj du landoj pro la lingva barilo kaj la eblo forigi tiun malfacilon per la enkonduko de Esperanto kaj esprimis esperon ke ambaŭ la ĉeĥoslovakaj kaj ĉinaj esperantistoj plenumos tiun rolon.

Por bone kompreni al niaj gastoj la situacion de la ĉina esperanta movado kamarado Hontŝen, reprezentanto de nia redakcio, faris mallongan raporton kaj montris al ili la materialojn kiujn ni ricevis el Ĉeĥoslovakio kaj aliaj landoj.

Tiuj paroladoj ege interesis la delegitaron. Doktoro J. Prušek kaj Z. Hrdlička esprimis sian favoron al Esperanto kaj la dankemon al la ĉinaj esperantistoj, al kiuj Z. Hrdlička salutis je la nomo de Ĉeĥoslovakaj esperantistoj. Fine li petis ĉinaj esperantistojn doni konsilion al ilia esperanta laboro, por la estonta plibonigo.

Simpla estis la akcepto, tamen harmonia kaj amika estis la atmosfero. Ĉiuj gojis kaj aplaudadis, precipe kiam Doktoro J. Prušek parolis dankeme per ĉina lingvo kaj esprimis sian opinion pri la rolo de Esperanto en la pabatalo. Ni esperas, ke la kunlaboro inter la ĉeĥoslovakaj kaj ĉinaj esperantistoj en la batalo por paco kaj demokratio kune kun la progresemaj esperantistoj en aliaj landoj pli kaj pli intimiĝos.

La Malgvanda Administranto

(Daŭrigo de p. 7)

"Ne faru tian brulon! Hejmeniru rapide. Mi estas okupata."

Lia edzino, estante infaneca junulino, ne aŭskultis al li kaj ĉiam kriis:

"Nel! Hodiaŭ vespere mi restos ĉi tie, se vi ne hejmeniros kun mi." Dirante, ŝi provis deŝiri de li la plumon.

Li levis la plumon alte kaj diris ridante:

"Mi ne havas tempon hejmeniri, se vi ne volas reiri, kial ne dormu ĉi tie dum la nokto?"

Li diris tion nur ŝerce. Sed la edzino respondis provokante:

"Vi kredas, ke mi ne kuraĝas resti? Kial ne? Ĉi tie ja neniu alia ĉeestas." Ŝi kuŝigis sin sur lian liton kaj diris obstine: "Mi restas." Li fermis la pordon senkonsilige. Sed li ankoraŭ ne bone skribis la vorton ĉiang, do li residigis kaj daŭrigis la skribadon. Li ekripozis nur kiam li povis skribi preskaŭ same bone kiel Vang Ĉung.

Post duonjaro li ellernis preskaŭ ĉiujn uzendajn vortojn por librotendado. Tiel ekipite, li jam parolis al Vang Ĉung kun pli firma tono kaj montris malpli da cedemo. Vang Ĉung ofendigis kaj ŝajnigis malsanon. Dum tri sinsekvaj tagoj li ne aperis en la kooperativo. La kvaran, San-ŝi iris viziti lin. Li bone sciis, ke la malsano estas nur ŝajnigo, sed lin konsolis zorgeme:

"Ripozu iom kaj ne maltrankviligu! La kooperativon mi prizorgos provizore."

Vang Ĉung konfuziĝis, trovante lin tute trunkvila kaj diris en si: "Mi ŝajnigos malsanon dum duona monato kaj vidos kiel la afero iros sen mi."

Du semajnoj pasis, sed San-ŝi montris nenian signon de maltrankviligo. Nun Vang Ĉung mem ne povis konservi la aplombecon kaj iris al la kooperativo kun sevolemo.

Kiam li enpaŝis, San-ŝi ŝajnigis seriozan mienon kaj diris:

"Ĉu pli bone nun? Dum tiuj tagoj, iom da aferoj min katenis, ke mi ĉe ne havis tempon por viziti vin."

Vang Ĉung diris ion por esprimi sian dankemon kaj sidigis.

Apenaŭ sidiginte, li sciivolis, kion da ridindaj eraroj San-ŝi faris dum la du semajnoj en la librotendado, kaj malfermis la ĉemanan tagkonton. Intertempe San-ŝi diris kvazaŭ malpersvade: "Ripozu momente, ne maltrankviligu! Vi ĵus resaniĝis, ne laicigu vin mem!"

Je lia surpriziĝo, li trafolumis la tagkonton, sed trovis, ke ne nur tre malmulte da misuzitaj vortoj trafas lin dum la trarigardo, ĉe la plej malsimplajn kontojn, ekzemple, interŝanĝon de greno kontraŭ komercaĵoj, kontantajn kaj kreditajn, li notis korekte. Li foliumis aliajn kontlibrojn kaj trovis la samon. Se ekzistis diferenco inter San-ŝi kaj li mem, tio estis, ke San-ŝi skribis malpli lerte ol li.

Nun li konsejis: se li ne ĉesus krei malfacilaĵon al San-ŝi, li estos baldaŭ eksigita. Se li perdis la nunan pozicion, li ne trovos alian (la oficeo de administranto estis senpaga, sed la kasisto estis salajrata. Li iom hezitis antaŭ ol li eldiris kulpokonsejo:



Ekde la 12-a ĝis la 18-a en decembro de 1950 akompanante la kontraŭusonon kaj porkorean movadon aranĝigis en Pekino filma semajno de popoldemokratiaj landoj. Prezentitaj estas entute ok filmoj: t. e. *Ivan Susanin* el Bulgario, *Silenta Barikado* el Ĉeĥoslovakio, *Ĉian Preta* el Germana Demokratia Respubliko, *La Tero Sub Via Piedo* el Hungario, *Mia Hejmvilaĝo* el Koreio, *La Lasta Stadto* el Pollando, *Sonoras la Volo* el Rumanio kaj du dokumentaj filmoj el Mongolio: *La Mongolia Popola Respubliko* kaj la *29-a Datreveno de la Mongolia Popola Respubliko*.

La prezentadon vizitis ĉirkaŭ 8,000 personoj inkluzive laboristojn, kamparanojn, armeanojn, lernantojn, kulturajn laborantojn, kadrojn en ĉiuj organizoj kaj oficeistojn en la ambasadorejoj de la frataj landoj. Ĉiuj tiuj filmoj ricevis entuziasmajn aplaŭdojn.

Tio plene montras la ardan amon kaj amikecon de la ĉina popolo al la frataj demokratiaj landoj.

La novjaraj bildoj estas la plej ŝatata artaĵo de la ĉinaj kampanoj. Precipe post la novjaro laŭ la luna kalendaro oni povas ilin trovi preskaŭ en la hejmoj de ĉiuj familioj kiuj kapablas sinnutri. Sed antaŭe tiu arta formo estis neglektita de la artistoj kaj ĝiaj enhavoj plejparte estas malprogresemaj kaj la temoj estas ideologie esence

"Mi tre bedaŭras, ke mia malsano multe ĝenis vin dum la du semajnoj. Mi forte maltrankviligis sed ne povis helpi. Nun mi resaniĝas, mi translogigos ĉi tien morgaŭ."

San-ŝi diris serioze kiel antaŭe:

"Laŭ via plaĉo! Sed mi ne vin urgigas. Sano estas la ĉefa afero."

Post tiu momento, Vang Ĉung fariĝis obeema. Li faris ĉion bonvole, kion San-ŝi ordonis, samkiel antaŭe, kiam li servis sub Ĉang Taj, kaj neniam 'marĉandis'. Je la komenco de ĉiu monato li bilancis la konton antaŭ ol San-ŝi aludis. Dume San-ŝi ankaŭ traktis lin pli afable, trovante ke li konvertiĝis. Ankaŭ Vang Ĉung pli kontentiĝis je la oficeo ol kiam li estis la helpmano de Ĉang Taj.

San-ŝi raportis al la partia ĉelo, kiel li transformis Vang Ĉung. Ĝuste en tiu tempo la ĉelo instigis la kadrojn al laborkonkura kampanjo kaj ĝi enigis la nomon de San-ŝi en la liston de laŭdindaj laborantoj.

Trad. S. J. Zee.

1) Kunveno en kiu oni plendas kaj akuzas kontraŭ siaj subpremitoj kaj ekspluatintoj.

2) Administra vilaĝo estas administra unuo arte "farita, diferenca de natura vilaĝo kiu nature elkreskas kaj eble ne konvenas por esti administrata kiel unuo.

3) Dum la Kontraŭ-japana Rezistimilo, por unuflanke kontentigi la postulon de la kampanoj kaj aliflanke unuigi la bienulojn en la unueca fronto kontraŭ-japana, terhapago kaj rentumo estis unuflanke reduktitaj dum aliflanke garantitaj en la liberigitaj regionoj.

feŭdaj. Post la liberiĝo tiu ĉi arta formo ricevas altan atenton. Multaj artistoj sinokupiĝas pri kreo de tiaj bildoj. Lastjare tiu ĉi laboro akiris pli grandan disvolviĝon. En Orienta Ĉinio, estas 240 specoj da novjaraj bildoj eldonitaj sub la gvido de lokaj artistaj organizoj kaj la kultura fako de la Milita kaj Politika Konsilo de Orienta Ĉinio. La eldona kvanto atingis 3,000,000, ekzemplerojn. Pliriĝis ankaŭ la enhavoj. Ili ĉefe temas pri la agrara reformo, kontraŭ Usona agreso, defendo al mondpaŭco, instigo al laboro kaj produktado, laŭdo al la batalherooj kaj labormodeloj ktp.

En la kontraŭagresa movado literaturaj ludas gravan rolon en propagando. Nur en lastaj du monatoj centoj da literaturaj temantaj pri usona agreso estas verkitaĵoj. Por bone konigi la verkojn kaj pli disvastigi la propagandon en la vesperoj de la 23-a kaj 24-a en decembro, 1950 en Pekino aranĝigis dramprezentado de la novaĵ verkoj. Prezentiĝis entute 15 teatraĵoj. Inter ili troviĝis jango-dramoj *Por Protekto al Produkto* (為了保護生產) kaj *Firme Tenu la Pafilon* (緊握手中槍) opero *Venko Apartenas al la Popolo* (勝利屬於人民) kaj dramoj *Popola Volo* (人民的意志), *Frateco* (兄弟之誼), *Junaj Gerilanoj* (青年游擊隊員) kaj *La Patrino Koro* (母親的心). Krome prezentiĝis ankaŭ diversaj artformoj ekzemple ritmaj rapid-rakontoj, spritaj dialogoj

kaj kantoj kun diversaj muzikaj akompanoj.

Je la 14-a lastmonate venis Pekinon kvin studentoj el Popola Respubliko Bulgario. Reprezentantoj de ĉinaj studentoj ilin bonvenigis ĉe la stacio kaj prezentis al ili florojn. Inter la bonvenigintoj ĉe la stacio troviĝas ankaŭ Huang Ŝin-min (黃新民) de la Eduka Ministerio, Jang Ĉeng (楊誠), estro de la Studenta Fako de la Novdemokratia Junula Ligo, Nieh Veĵ-ĉing (蔣維縈) kaj Li Ŝiu-ĉen (李秀貞), vic-estroj de Tutĉinia Studenta Federacio. Krome ĉeestis ankaŭ la Konsilanto P. N. Tzarvoulano de la Bulgaria Ambasadorojo en Pekino.

Vespere iu festeno estas aranĝita de la Eduka Ministerio por ilin akcepti. Oni esperas, ke per ilia lerno la kultura rilato inter Ĉinio kaj Bulgario pli kaj pli intimiĝos.

Je la 24-a de la lasta monato venis al Pekino la Sporta Delegitaro de Sovetunio, kies korbopilka teamo estis invitata por amika konkurso kun la korbopilka teamoj de Pekino, en la unua tago la Sovetia teamo per 56 kontraŭ 43 kaj en la dua tago per 91 kontraŭ 17 venkis Pekinan Teamon. La alta tekniko kaj la sporta moralo akiris vastan laŭdon de la Pekinaj teamoj kaj ĉiuj rigardantoj.

PAGU LA NIAJ PERANTOJ

- BELGIO:** Walraevens Rájmund, Rabelais Strato, 10 Bruselo. (Jarabono: 50 bfr.)
- BRITLANDO:** Collet's Subscription Department, 40 Great Russell Street, London, W. C. 1. (Jarabono 6 ang. ŝil.)
- ĈEĤOSLOVAKIO:** Slovaka Esperanto-Instituto, T. S. Martin, Kuzmany-str. 29. ĈSR-Slovakio. (Jarabono 50 kĉs.)
Burda Rudolf, Plzen-palackeĥo N. 66,
- FINNLANDO:** Niilo Kavenius, Niklaksenkatu 10/14 Turku. (Jarabono: 300 Fmk.)
- FRANCIO:** Labor-Esperantista Federacio, 34, Str. Chabrol—PARIS—X. (OCP. Paris 902-52) (Jarabono: Fr. Fr. 450)
- GERMANIO:** Arthur Schulze, Berlin-Lübars, Kolonie, Waldesfrieden 77. (Jarabono: 6 D.M.)
Erich Rödel, Leipzig W 33, Becherstr. 10.
- HUNGARIO:** IBUSZ, Budapest, V. Akademia u. 10. (Jarabono 20 forintoj)
- ITALIO:** Itala Laborista Esperanto-Asocio, Via Modena 33—Torino. (Jarabono: 400 lirej)
- IZRAELIO:** Bencion H. Danon. Kibuc Afikim, (Jarabono: 400 prutoj)
- NORVEGIO:** Norvega Esperantisto, Redakcsjone, Boks 942, Oslo. (Jarabono 6 kronoj)
- POLLANDO:** Isaj Dratwer,—Asocio de Esperantistoj en Pollando Warszawa Marszalkowska 81/32 (Poŝtĉeka konto P.K.O. I 8266/115) (Jarabono 4 zl.)
- RUMANIO:** Rumana Esperantista Societo, Bucureŝti I, Bulev. 6 Martie 15, et. I. (Jarabono: 120 leoj)
- SVEDIO:** Einar Adamson, Värmlandsgatan 18, Göteborg. (Jarabono 6.50 kronoj)

- Rim.: 1) Senpagan specimenon ni sendos al ĉiu, kiu letere postulos. Se iu volas regule ricevi nian gazeton, pagu laŭ la supra tarifo.
- 2) Legantoj en ceteraj landoj povas aboni nian gazeton ankaŭ ĉe iu el la supraĵ perantoj al kiu li trovas rimedon pagi aŭ rekte ĉe nia administracio por internaciaj respond-kuponoj (1 respond-kuponon por ĉiu ekzemplero aŭ samvaloraj novaj esperantaj libroj, sed de individuaj legantoj ni ne akceptas gazetojn.
- 3) Korospondan anoncon ni ne akceptas pro manko de spaco.

國內定價：每期基價一元五角。全年十二期基價十八元。平寄郵費在內。掛號另加